# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Junio : 3 2022


## LA EKSTRADICIO DE JULIAN ASSANGE APROBITA DE LA BRITA REGISTARO

La ministro pri internaj aferoj de la brita registaro aprobis, la pasintan vendredon, la ekstradicion al juraj instancoj de Usono de Julian Assange, aŭstralia civitano. Tutcerte, la advokataro de la fondinto de *WikiLeaks* apelacios por eviti la transdonon de Assange. Usonaj aŭtoritatuloj akuzas lin pro plenumado de 18 deliktoj, inter ili spionado kaj publikigo de konfidencaj informoj kiuj endanĝerigis usonajn militistojn.



’ S-ro Julian Assange dum sia restado en la Ekvadora Ambasadejo en Londono.

Male, la apogantoj de Julian Assange asertas, ke li estas heroa kontraŭsistemulo, kiu diskonigis neleĝajn farojn plenumitajn de Usono dum militoj en Afganio kaj Irako. Laŭ ili, se li estas enprizonigita, tio estus atako kontraŭ la esprim-libereco.

Nun, la advokatoj de Assange rajtas prezenti apelacion kontraŭ la ekstradicio dum 14 tagoj. La juĝo de la Supera Tribunalo en Britio asertis, ke la ekstradicio de Assange ne estas kontraŭleĝa aŭ nekongrua kun la homaj rajtoj. Same, la brita tribunalo konsideris, ke okaze de la ebla transdono, tutcerte li estos bone traktata, eĉ rilate siajn san-kondiĉojn.

La afero pri la ebla ekstradicio de S-ro Assange komenciĝis antaŭ dek jaroj. Unuamomente la svedaj aŭtoritatuloj petis la ekstradicion de la aŭstralia informadikisto, akuzita pri seksa perforto. Brita tribunalo ordonis la provizoran liberigon de Assange, kiu poste eniris en la ekvadoran ambasadejon, tie li petis azilon. En la ambasadejo li restis dum sep jaroj. Tuj post sia eliro el la diplomatia sidejo, li estis arestata. Tiam, la usonaj aŭtoritatuloj petis la ekstradicion de la fondinto de *WikiLeaks*.

# Vorto de la Semajno

**Asisti**: Pro oficiala funkcio, prizorgi kaj helpi, por levi la socialan staton de iaj kategorioj de civitanoj

**Asistado**: Stato kaj agado de tiu, kiu asistas.

**Asistanto:** Persono, kies ofico estas asistado.


JURA
TRIBUNO
INTERNACIA §

N-ro 21
Jaro 2022 : 1
Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Antaŭ la okazigo de la venonta Universala Kongreso de Esperanto, Montrealo de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto, aperos nova numero de nia revuo *JURA TRIBUNO INTERNACIA,* jam la 21-a numero. Se Vi deziras kunlabori pere de artikolo, eseo, informo, ktp. Bonvolu kontakti kun la redaktantaro de la revuo ĉe la ret-adreso: jurista@esperanto.ac